

Turismo

KELKAJ NOTOJ PRI LIBANO


En Libano, dum la somero, la vizitanto povas iri jen al la marbordo, kie kreskas tropika vegetalaro, jen en la montaro sur kiu, laŭ la altitudo, kreskas variaj vegetaĵoj, la olivarbo kaj la biblia cedro. Sur la marbordo sin kaŝas multaj malgrandaj banlokoj, kie, sub la malvarmetigaj pinoj, troviĝas vilaoj kaj hoteloj superstarantaj la blinde lazuran maron.

Kion turisto devas nepre viziti en Libano?

Baalbeck. — La kolosaj ruinaĵoj de romiaj temploj dediĉitaj al la suno, kun la famekonata Internacia Festivalo de Danco, Teatro kaj Muziko, altiras vizitantojn el la tuta mondo.

La Cedroj. — Tie revis Lamartine, Nerval, Renan, Barres. Hodiaŭ ski-ĉampionoj fulme glitas inter la arboj jam ekzistantaj antaŭ Kristo.

Tripoli. — Mezepokaj mirindaj moskeoj staras apud la kastelo de la grafoj de Tuluzo. La urbo rapide grandiĝas.



Beit-Eddine. — Vera sonĝo de la « Mil unu noktoj », tie situas la palaco de la Emiraj de Libano.

Byblos. — La plej antikva urbo en la mondo. Dum jam pli ol 6.000 jaroj, la civilizacioj lasis postsignojn en tiu mirinda loko inter la olivarboj, ĉe la marbordo.

Tyr. — Unu el la antikvaj metropoloj. Nia civilizacio dankas al ĝi sian ekziston. Nur hodiaŭ oni malkovras tiun fabelan panteonon.

Jeita. — Unu el la tri plej belaj grotoj en la mondo, apud Nahr El Kelb (rivero de la hundo), kie konkerantoj el la tuta mondo, Ramses III-a, Aleksandro, Allenby, Lawrence, k.a. postlasis steleojn skulptitajn sur la klifo super la rivero kaj la maro.

Beyrouth. — Urbo de « Mil unu noktoj » necesa ligopunkto inter Oriento kaj Okcidento, fama pro sia Acapulco Strando.